

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo  
Bulletin mensuel du Groupe Espérantiste Gantois  
Maandelijksch tijdschrift van den Gentschen Esperantisten Groep.

---

REDAKCIO :

RÉDACTION :

REDACTIE :


Michel Sebruyns

34, Rue de Gand,

MONT-ST-AMAND

LEZ GAND.

---




---

ADMINISTRACIO :

kaj ANONCOJ :

ADMINISTRATION  
et ANNONCES :

ADMINISTRATIE en  
AANKONDIGINGEN :

Henri Petiau

60, Boul<sup>d</sup> St. Liévin

GAND.

---

**Enhavo :** Tri Demandoj. - Priskribo de la urbo Gento. - Komerca Fako. - Kolektado. - Interŝanĝado.

**Sommaire :** Nécessité d'une langue Universelle. - Cours d'Espéranto.

**Inhoud :** Noodzakelijkheid eener Wereldtaal. - Leergang van Esperanto.

---

Unu numero 0.10 fr. Le numéro 0.10 fr. Het nummer 0.10 fr.  
Abonprezo : 1 fr. po jaro (Belgujo) 2 fr. po jaro (eksterlando)

GENTO 1913.

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo.

Redakcio :

MICHEL SEBRUYNS

RUE DE GAND 34, M<sup>t</sup> S<sup>t</sup> AMAND (Gand.)

Administracio kaj Anoncoj :

HENRI PETIAU

60, BOULEVARD ST. LIÉVIN, GAND.

Ne presitajn manuskriptojn oni ne resendas. La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

Por ĉio, kio koncernas la redakcion, sin turni **eksklusive** al la ĉefredaktoro S<sup>ro</sup> M. SEBRUYNS, 34, Rue de Gand, Mont St. Amand, (Gand.)

## Nécessité d'une langue Universelle      Noodzakelijkheid eener Wereldtaal

### L'Espéranto et la Littérature

Personne n'ignore combien les traductions laissent à désirer.

Un auteur, qui écrivait dans sa langue nationale, aurait donc un très grand avantage à faire exécuter, sous ses yeux, une traduction unique en Espéranto, qui mettrait ses œuvres, fidèlement interprétées, à la portée des lecteurs de tous les pays.

### L'Espéranto et la Science.

Quantité de grands savants, dans une spécialité déterminée, seraient naturellement désireux de connaître presque tous les travaux publiés « sur la matière » par les plus éminents spécialistes des pays étrangers ; et, pour cela, ils se butent sans cesse à la difficulté, pratiquement insoluble, de connaître huit ou dix langues. Seul, l'Espéranto donne à cette

### Esperanto en de Letterkunde.

Iedereen weet hoeveel de vertalingen te wenschen laten. Een schrijver, die zijne werken in zijne moedertaal zou opstellen. zou dus een zeer groot voordeel vinden met deze, onder zijn toezicht, slechts ééne enkele vertaling te doen ondergaan in Esperanto, hetgeen hem zou toelaten ze in het bereik te stellen van de lezers der geheele wereld, en dit op de beste wijze weergegeven.

### Esperanto en de Wetenschappen.

Eene zeer groote hoeveelheid geleerden, van het een of ander bijzonder vak, zouden natuurlijk begeerig zijn al de werken te kennen die hun vak betreffen en uitgegeven worden door de voornaamste deskundigen der vreemde landen ; en daarom stuiten zij zich gedurig tegen de moeilijkheid, die op praktische wijze

question une solution simple autant qu'élégante.

### L'Espéranto sur les Champs de Bataille.

Il est de toute évidence que l'Espéranto rendrait aux infirmiers militaires des services éminents. La rivalité cesse devant la souffrance : par le truchement offert par le docteur Zamenhof, les infirmiers des partis belligérants pourraient, au plus grand bénéfice des blessés, se donner des renseignements utiles, se prêter parfois le plus efficace des concours.

Supposez un soldat blessé sur un champ de bataille, et relevé par des brancardiers d'une autre nationalité que la sienne ; on transporte le blessé dans une ambulance où un chirurgien étranger lui donne des soins ; comment toutes ces manœuvres pourront-elles se faire, si aucun des acteurs de cette scène ne peut se faire comprendre ?

Dans les derniers congrès espérantistes, et notamment dans celui de Dresde, il a été fait avec des soldats, sur le terrain, des expériences de « service d'ambulanciers en campagne », qui ont donné les plus concluants résultats.

### L'Espéranto dans les postes, les télégraphes, les téléphones, les transports publics, etc.

On sait toutes les difficultés qu'ont les voyageurs, dans un pays autre que le leur, quand ils ont affaire, à un titre quelconque, dans les bureaux de poste des pays étrangers où ils

onopiosbaar is, namelijk acht of tien talen te kennen. Slechts Esperanto laat toe deze moeilijkheid op eenvoudige en ook eigenaardige wijze uit den weg te ruimen.

### Esperanto op de Slagvelden.

Het is onweerlegbaar dat Esperanto de grootste diensten aan de kriegsziekenverzorgers zou kunnen bewijzen. De vijandelijkheid verdwijnt voor het lijden : door de tolk door dokter Zamenhof aangeboden zouden de ziekenverplegers der oorlogvoerende partijen zich nuttige inlichtingen kunnen geven en somwijlen zich hulp kunnen bieden, hetgeen zeer voordeelig voor de gewonden zou zijn.

Neem b. v. eenen soldaat, die op het slagveld gewond geworden is, en door berriedragers opgeraapt van eene andere nationaliteit dan de zijne ; men draagt den gekwetste in een veldhospitaal waar een vreemde heemeester hem verzorgt ; hoe zou dit alles kunnen geschieden indien geen enkele dezer lieden zich kan doen verstaan ?

Gedurende de laatste kongressen, en o. a. gedurende dat van Dresden, heeft men, op aangeschikte plaatsen, met soldaten beproefd eenen dienst in te richten van veldhospitaalbedieners, dienst, die den besten uitslag gegeven heeft.

### Esperanto in den Post, de Telegraaf, de Telefoon, de publieke Vervoermiddelen, enz.

Men weet al de moeilijkheden die die de reizigers hebben in een ander land dan het hunne, wanneer zij, voor d'eene of d'andere reden, te

voyagent. L'Espéranto une fois répandu, toutes ces difficultés seraient tranchées par la mesure bien simple, qui consisterait à rédiger en Espéranto, à côté du texte national, les formules imprimées ou manuscrites que l'on délivre au public, dans les bureaux de poste.

Le télégraphe donne lieu, dans sa sphère, à plus de difficultés encore, qui seraient, du coup, victorieusement résolues par l'adoption universelle de l'Espéranto.

Et au téléphone, à l'étranger, comment faire cette opération de demander un numéro à la téléphoniste ?

On peut encore trouver pour l'Espéranto la même utilité dans les ports, et dans les bureaux de la douane, pour la rédaction des lettres de voiture, des connaissements, etc. L'adoption de l'Espéranto, dans les postes et la douane, est déjà, paraît-il, un fait accompli au Brésil. Cet état d'Amérique nous semble, dans la circonstance, montrer au Monde entier le chemin du progrès.

Combien l'Espéranto serait encore utile pour les employés de chemin de fer de toutes les nations ! Nous pensons que nous n'avons pas besoin d'en faire la démonstration.

En France, le Touring-Club a aidé de tout son pouvoir au succès de l'Espéranto, dont il a si bien compris l'utilité, qu'il a, depuis cinq ans, introduit dans son « annuaire des pays étrangers » un vocabulaire Espérantiste, contenant toutes les expressions dont un touriste peut

doen hebben in de postbureelen der vreemde landen waar zij zich bevinden, Esperanto eens verspreid, zou zouden al deze hinderpalen verdwijnen door den zeer eenvoudigen maatregel, die zou bestaan in de gedrukte of geschrevene formulieren die men aan het pubtek verschaft in de postbureelen, nevens de nationalen tekst ook in 't Esperanto op te stellen.

De telegraaf geeft, voor wat hem betreft, nog meer aanleiding tot moeilijkheden, welke ineens uit den weg geruimd zouden worden door de algemeene aanneming van Esperanto.

En aan den telefoon, in den vreemde, hoe de handeling gedaan die bestaat in het vragen van een nummer aan de telefoonbediende ?

Men kan nog voor Esperanto hetzelfde nut vinden in de havens, en ook in de bureelen der tol. voor het opstellen der vrachtbrieven, congnoisements, enz. enz.

De aanneming van Esperanto, in de post en in de tol is reeds, naar het blijkt, eene gedane zaak in Brazilië. Deze Amerikaansche staat schijnt ons, in het geval, aan de geheele wereld den weg des vooruitgangs aan te duiden.

Hoe nuttig zou Esperanto ook al niet zijn aan de spoorwegbedienenden aller landen ! Wij gelooven dat wij niet hoeven het bewijs er van te geven.

In Frankrijk heeft de Touring-Club uit al zijne macht medegeholpen tot het welslagen van Esperanto, waarvan hij zoo zeer het nut begrepen heeft dat hij, sedert vijf jaren, in zijn «jaarboek der vreemde landen» eene Esperantistische woordenlijst gevoegd heeft, welke al de uitdrukkin-

avoir besoin, en chemin de fer, au garage, ou à l'hôtel.

### L'Espéranto chez les Aveugles.

Les progrès de l'Espéranto dans le monde si intéressant des aveugles ont été très rapides, et aujourd'hui plusieurs centaines d'aveugles, disséminés sur toute la terre, lisent, écrivent et parlent l'Espéranto.

Les aveugles ont un organe mensuel, « Esperanta Ligilo » (Lien Espérantiste). Ils ont, en outre, des grammaires, dictionnaires en trois langues, une quinzaine d'ouvrages imprimés en relief dans leur alphabet spécial. Le mouvement s'étend, avec une rapidité de plus en plus grande, dans le monde entier.

### CONCLUSION.

Nous résumerons d'un mot ce long chapitre « de la nécessité d'une langue universelle, » quand nous dirons qu'il existe environ 1000 langues dans le monde, qu'il y a 17 langues nettement différentes dans l'Empire d'Autriche, et que, dans la seule ville de Tiflis, on en parle 70 !!...

*Esperantistes! Favorisez les firmes et les personnes, qui font de la réclame dans notre " Bulletin „ et dans les magasins, où vous achetez, dites que vous êtes Espérantistes!*

*Esperantisten! Bevoordeelt de magazijnen en de personen, die aankondigingen in ons " Bulletin „ plaatsen en, in de magazijnen, waar gij uwe aankopen doet, zegt dat gij Esperantisten zijt.*

gen bevat die een toerist noodig kan hebben in den trein, in de bergplaats of in het hotel.

### Esperanto bij de Blinden.

Devooringang die Esperanto deed in het zoo belangwekkend middel der blinden is zeer groot, en heden zijn er verscheidene honderden blinden, over geheel de wereld verspreid, die Esperanto lezen, schrijven en spreken.

De blinden hebben een maandelijksch orgaan, « Esperanta Ligilo » (Esperantistische Band). Zij hebben daarbij nog spraakleeren, woordenboeken in drie talen, een vijftiental werken gedrukt met hunne speciale teekens. De beweging spreidt zich, met eene immer vergrootende snelheid, over de geheele wereld uit.

### BESLUIT.

Wij zullen in één woord dit lang hoofdstuk der « noodzakelijkheid eener wereldtaal samenvatten. wanneer wij zullen zeggen dat er ongeveer 1000 talen in de wereld bestaan, dat er in Oostenrijk 17 talen zijn die niet de minste betrekking onder malkander hebben, en dat, enkel in de stad Tiflis, er 70 verschillende gesproken worden !!...

## Cours d'Espéranto Leergang van Esperanto

Corrigé de la Traduction de la 6<sup>e</sup> Leçon.

1. La catastrophe eut lieu en l'an 1827. 2. Mes 7 frères-et-sœurs sont un peu indisposés. 3. Je vous supplie, ne dénigrez pas mes excellents parents. 4. L'averse cesse, il ne pleut plus que finement. 5. L'impératrice est morte en l'an 1807. 6. L'eau est froide, puis elle est tiède, un peu chaude, chaude, très chaude et enfin bouillante. 7. Que vous êtes blême! 8. Un boulet de canon et 13 balles tombèrent dans l'église. 9. Elle vous récompensera triplement. 10. Cinq personnes reçoivent 280 fr.; la 1<sup>e</sup> les 5/12, la 2<sup>e</sup> 3/16, la 3<sup>e</sup> 1/7, la 4<sup>e</sup> 2/9, la 5<sup>e</sup> le reste. 11. Jean a 18 fr., mais Michel a le triple. 12. Venez à dix dans le jardin.

### 7<sup>e</sup> LEÇON

#### Les Prépositions.

Notez bien, qu'en Espéranto, chaque préposition a un sens absolument certain, qui nous guide sur son usage. Il est donc très important de chercher minutieusement la préposition convenable, avant d'en faire usage, sur'out qu'en Français rien n'est plus indéterminé que le sens des prépositions. Ainsi la préposition « AVEC » exprime en Français, tantôt l'instrument, tantôt l'accompagnement. Dans le 1<sup>er</sup> cas, on devra la traduire par « PER » dans le 2<sup>e</sup> par « KUN ».

Verbetering der Oefening op de 6<sup>e</sup> Les.

1. De ramp gebeurde in 't jaar 1827. 2. Mijne 7 broeders-en-zusters zijn allen wat ongesteld. 3. Ik smeed u, bezwalk(t) mijne uitmuntende ouders niet. 4. De regenbui houdt op, het mijzelt nog slechts. 5. De keizerin stierf in 't jaar 1807. 7. Water is koud, dan is het lauw, een weinig warm, warm, zeer warm en eindelijk kokend-heet. 7. Wat zijt gij doodsbleek! 8. Een kanonbal en 13 kogels vielen in de kerk. 9. Zij zal u drijvoudig beloonen. 10.5 personeu ontvangen 280 fr.; de 1<sup>e</sup> de 5/12, de 2<sup>e</sup> de 3/16, de 3<sup>e</sup> 1/7, de 4<sup>e</sup> 2/9, de 5<sup>e</sup> de rest. 11. Jan heeft 18 fr. maar Michiel heeft het drijvoud. 12. Komt getienen in den hof.

### 7<sup>e</sup> LES

#### De Voorzetsels.

Bemerken wij wel, dat in Esperanto, ieder voorzetsel een volstrekt bepaalden zin heeft, die ons leidt bij zijn gebruik. Het is dus zeer noodzakelijk, nauwkeurig het juiste voorzetsel op te zoeken, vooraleer het te gebruiken, te meer daar niets onbepaald is, in de Vlaamsche taal, dan de zin der voorzetsels. Zoo drukt het voorzetsel « MET » in 't Vlaamsch, nu eens het werktuig uit dan de begeleiding. In 't 1<sup>e</sup> geval vertalen men het door « PER » in 't 2<sup>e</sup> door « KUN ».

Ex.-Voorb. — Venu kun mi (Venez avec moi-kom mede met mij); Oni segas per segilo (On scie avec une scie-men zaagt met eene zaag).

Voici la signification des principales prépositions :

AL (à, vers); KUN (avec-l'accompagnement); PER (avec, au moyen de); POR (pour, en faveur de); PRI (de, sur, concernant); PRO (pour, à cause de); SUR (sur, qui touche à).

Quand, après une sérieuse recherche on ne trouve pas de préposition convenable, on peut employer la préposition : « JE » qui, seule en Espéranto, n'a pas de signification précise.

Ex.-Voorb. — Ĉesu je ridi (cessez de rire-scheid uit van lachen); Plena je akvo (plein d'eau-vol water); Je la sesa (vers 6 heures-rond den zessen.)

#### L'Accusatif facultatif.

Au lieu d'une préposition quelconque, on peut employer l'accusatif, si la clarté de la phrase n'en souffre pas.

Ex.-Voorb. — Ni iru nian vojon (Allons notre chemin-zetten wij onzen weg voort); Pardonu min (pardonnez-moi-vergeef mij); Obeu ni niajn gepatrojn (obéissons à nos parents-laat ons onzen ouders gehoorzamen.)

Mais on doit dire pour la clarté :

Pardonu al mi mian kulpon (pardonnez-moi ma faute-vergeef mij mijne faut), Pagu la kalkulon al la tajloro (Payez la note au tailleur-betaal de rekening aan den kleermaker).

#### Suffixe « UL »

« UL » désigne l'être caractérisé par la qualité, exprimée par la racine (qualité acquise ou qualité naturelle.)

Ziehier de beteekenis der voornaamste voorzetsels :

AL (aan, naar); KUN (met-de begeleiding); PER (met, bij middel van); POR (voor, ten voordeele van); PRI (van, over, betrekkelijk); PRO (voor, om reden van); SUR (op, dat raakt aan

Wanneer men, na een ernstig onderzoek, geen passend voorzetsel vindt, gebruikt men 't voorzetsel « JE » het eenigste woord, dat in Esperanto geene bepaalde beteekenis heeft.

#### Niet verplichte accusatief.

In plaats van een welkdanig voorzetsel, mag men den accusatief gebruiken, indien de klaarheid van den zin er niet door lijdt.

Maar, voor de duidelijkheid, moet men zeggen :

#### Achtersvoegsel « UL »

« UL » duidt aan het wezen gekenmerkt door de hoedanigheid, door den stam uitgedrukt (aangeworvene of natuurlijke hoedanigheid.)

Ex.-Voorb. — Ĝibo (bosse-bult); ĝibulo (bossu-bultenaar); Riĉa (riche-rijk); riĉulo (un riche-rijkaard); Juna (jeune-jong); junulino (jeune fille-jong meisje); Kun (avec-met); kunulo (compagnon-gezel).

#### Titre général de Politesse.

Le titre général de politesse, remplaçant : « Votre Majesté, Son Excellence, Monseigneur, etc. etc. est « MOŝTO ».

#### Algemeene beleefdheidstitel.

De algemeene beleefdheidstitel vervangende : « Uwe Majesteit, Zijne Excellentie, Monseigneur, enz. » is « MOŝTO ».

Ex.-Voorb. — Via reĝa Moŝto (Votre Majesté Royale-Uwe koninklijke Hoogheid); Ni vidis Lian Provincestroon Moŝton (Nous avons vu Monsieur le Gouverneur-Wij hebben Mijnheer den Gouverneur gezien); Ni amas iliajn Geprincajn Moŝtojn (Nous aimons leurs Altesses royales les Princes et Princesses-Wij beminnen Hunne Hoogheden den Prins en de Princessen.

#### Vocabulaire.

Krimo (crime-misdaad); Drinki (boire avec excès-zuipen); Rampi (ramper-kruipen); Surda (sourd-doof); Muta (muet-stom); Blinda (aveugle-blind); Koketa (coquet-pronkzuchtig); Freneza (iou-krankzinnig); Virga (virginal-maagdelijk); Super (au dessus de, sans toucher-boven of over); Tra (à travers-dwarsdoor); Trans (au-delà (ou) : de l'autre côté-over (of) : aan gene zijde); Duko (duc-hertog); Peco (pièce ou morceau ou miette-stuk [of] brok [of] beetje); Tempo (temps, dans le sens de : durée-tijd); Flanko (côté [ou] flanc-zijde [of] flank); Grafo (comte-graaf); Paŝo (pas-stap); Plendi (se plaindre-klagen [of] zich beklagen); Plaĉi (plaire-behagen [of] croire); Velo (voile d'un navire-zeil); Piedo (pied-voet); Haro (cheveu [ou] poil-haar); Lipo (lèvre-lip); Vango (joue-kaak); Maro (mer-zee); Korto (cour-koer); Bapto (baptême-doop); Papero (papier-papier); Nomo (nom-naam); Fiŝo (poisson-visch); Animo (âme-ziel); Rajto (droit, opposé à : devoir-recht, tegenovergestelde van : plicht); Bordo (bord [ou] rivage-boord [of] strand); Mezo (milieu-midden.)

#### Traduction.

1. En malsanulejo, je ĉiu paŝo oni renkontas malsanulojn. 2. Oni balaas per balailo. 3. Ĉu via dukina Moŝto deziras ion por triuki? 4. Kuglego flugis super la domo de la blindulino. 5. Obeu min, kaj mi pardonos al vi vian kulpeton. 6. Je kiu horo venos en nian urbon lia episkopa Moŝto. 7. Li mortis pro ma'amego. 8. La gepatroj laboradas por siaj infanoj. 9. La pakego estis plena je ŝtonoj. 10. Jen bela arta statuo de la Virgulino. 11. Pri kio paroladis lia grafa Moŝto? 12. Je lia dekstra flanko marŝas lia edzino kaj sia patrino. 13. Ne kriegu kiel frenezulo, pro amo al Dio! 14. Ni eniru la ĉambro de la surdmutulo. 15. Oni certe ridos je vi! 16. Pri kio vi plendas? 17. La birdo flugis trans la riveregion.

#### Vertaling.

## TRI DEMANDOJ

solvotaj de kompetentaj Esperantistoj.

Jam de kvin jaroj mi estas Esperantisto; jam de kvin jaroj mi lernas ĝin, uzas ĝin, praktikadas ĝin; mi laŭ mia povo ĝin propagandas, diskonigas, defendas! Ĝi fariĝis kaj estas mia plej kara kaj preferata okupiĝo, unu el la idealoj de mia vivo. Mi ĝin amas kaj respektas kiel artisto, la arton, piulo, religion. Tiu amo kaj respekto ĉiutage pliiĝas kaj plifirmiĝas, tial ke ĉiutage mi en ĝi eltrovas belajn kaj perfektajn, tial ke pli kaj pli ĝi montras al mi siajn netakseblajn kaj multenombrajn bonajn ecojn.

Estas do tute nature, ke mi abomenas la kritikojn kontraŭ ĝi kaj mi estas fiera, esti kalkulata en la nombro de la sennombraj « malprogresejuloj » kiuj, je ĉiuj siaj fortoj, klopodadas kaj bataladas, por ke neniu tuŝu la genian kreitaĵon de nia Maj... (mi preskaŭ skribis la malpermesitan vorton!) patro Zamenhof, aŭ enkonduku en ĝin ŝanĝojn, tiel nomatajn « plibonigajojn kaj perfektigajojn ».

Mi konsideras kiel ridindajn infanaĵojn, la esplorojn de la kelkaj kritikistoj lingvistoj, kiuj skribadas, diskutadas kaj interdisputadas, por scii, ĉu la verba finiĝo « AR » ne estus pli belsona ol « i », ĉu ne estus pli taŭga forigi la akuzativan « n » por ĝin anstataŭi per nova prepozicio; ĉu tia aŭ tia vorto ne estas pli universala aŭ alia, tial ke la unua estas retrovebla en la lingvoj de 157.189.945 da homoj kaj la dua nur en tiu de 157.188.742 da homoj, k. t. p., k. t. p.

Nedubeble ni devas, pro kaj por la bono de la ideo pri helplingvo internacia, ne kritiki, eĉ aprobi vortojn aŭ regulojn, kiuj al ni ne plaĉas aŭ ŝajnas nelogikaj aŭ facile reformeblaj aŭ anstataŭigeblaj.

Tion-ĉi mi persone fâras; la tri demandoj, pri kiuj mi tuj parolos, ne estas kritikoj - mi ege insistas pri tio-ĉi! - sed kvinjara sperto, pruvis al mi ke tiuj tri punktoj ŝajnas al multe da ne-esperantistoj kaj lernantoj-komencantoj nelogikaj kaj ke ili sekve iom malutilas kaj plimalfaciligas la enkondukon de Esperanto ĉe personoj, kiuj iom suspekteme ekstudas ĝin.

Mi insiste petas la kompetentulojn, kiuj legos ĉi-tiujn liniojn, fari la refuton al tiuj kontraŭdiroj, ne por la plezuro diskuti pri lingvaj demandoj, sed por ke mi, kaj ankoraŭ multe aliaj esperantistoj kontraŭreformemuloj povu, se la okazo sin prezentas, doni kontentigajn klarigojn al la kritikantoj.

### 1<sup>a</sup> Demando.

Mi legis antaŭ kelkaj semajnoj en alilanda ĵurnalo (kies nomo min ne rememoras nun) recenzon pri la libro de S<sup>o</sup> Schoofs: « *Kion patrino povas suferi* ». La recenzisto kritikis la vorton « mitulajo » (= ujo por mituloj), dirante ke li, nekomprenante la vorton, dismetis ĝin jenamaniere: Mit-

ul - uĵ - o; kompreneble, li ne sukcesis trovi la signifon! Kio estis la tialo? La vorto « mitulo » (moule-mossel) finiĝas per sufikso « ul » kiu havas la signifon: « estaĵo karakterizita per... » Tute nature estas do ke oni opinias ke « mitulo » estas estaĵo karakterizita per « mito »!

La lernantoj ofte renkontas saman malfacilecon, tial ke esperantaj radikvortoj finiĝas per sufiksoj; tio erarigas ilin kaj ŝajnas esti neperfektaĵo.

Jen listo de kelkaj el tiaj vortoj:

- AR. Trotuaro (trottoir-gaanpad); Buduaro (boudoir-pronkkamer);
- IN. Urino (urine-pis); Kazino (casino-kazino);
- ER. Utero (uterus-baarmoeder); Kratero (cratère-krater); Kaperi (flibuster-zeeschuimen).
- AD. Estrado (estrade-verhoog); Balado (ballade-balade); Balustrado (balustrade-trapleuning).
- ET. Koketa (coquet-behaagziek);
- UL. Betulo (bouleau-berk); Angulo (coin-hoek); Formulo (formule-formuul).
- AN. Fontano (fontaine-fontein); Satano (satan-satan).
- ID. Aspido (aspic-adder); Levido (lévite-leviet).
- ING. Laringo (larynx-strottenhoofd).
- UM. Kukumo (concombre-komkommer).

Mi tamen devas aldoni ke la nombro de tiaj vortoj estas rilate malgranda, kaj ke la malfacileco malaperas baldaŭ, post kelktempa studado de nia lingvo.

### Dua Demando.

Profesoro de Esperanto instruas en sia kurso jenan regulon: « AN » estas sufikso, kiu utilas por montri la partianon, la menbron, la enloĝanton.

Ekz. — Gento-Gentano; Bruselo-Bruselano; Lando-Enlandano; Vilaĝo-Vilaĝano; Ameriko-Amerikano; Afriko-Afrikano.

Tio-ĉi estas tre regule, sed li devas tuj aldiri: « la plejmulto de la landoj ne sekvas tiun regulon, efektive: Belgo estas la enloĝanto de Belgujo, Franco, de Francujo; Hispano, de Hispanujo; Japano de Japanujo, k. t. p.

Tuj la lernanto ekkrias: Jen regulo kun escepto! Do ekzistas escepto en Esperanto, kvankam oni ĉiam certigis min pri la kontraŭo.

Kion respondos la profesoro? Sed ankoraŭ pli li surprizigos siajn lernantoj, kiam li devos diri al ili: « jes tio estas escepto kaj eĉ tiu-ĉi escepto havas mem escepton, ĉar vi devas diri: Holando, kaj nomi ĝiajn enloĝantojn: Holandanojn; Ĉilo kaj Ĉilianojn; Indio kaj Indianojn; Irlando kaj Irlandanojn; Korsiko, kaj Korsikanojn; Maroko kaj Marokanojn, k. t. p.

Oni diros ke estas tiel pro la logikeco de la vortdeveno, sed tamen restas vere ke estas regulo kun escepto, io kio tre konfuzigas la profesorojn.

## Tria Demando.

Mi konstatis ofte, ke recenzistoj energie malaprobas la formon « Ne jam » kiun ili korektas per « Ne ankoraŭ ». Aliparte, la unua estas ofte uzata de lertaj kaj kompetentaj Esperantaj verkistoj. Kiu estas prava?

Mia flanke mi tiel rezonus: En Esperanto oni faras neajn frazojn per la simpla aldono de vorte « NE ».

Ekz. — Mi manĝas; mi ne manĝas. — Hieraŭ mi estis malsana; hieraŭ mi ne estis malsana. = Via frato ĉiam malgajnas; via frato ne ĉiam malgajnas.

Nu, kiam mi diras: « Mi estas *jam* resanigita » ŝagnas ke, uzante la regulon, mi devas diri: « mi *ne* estas *jam* resanigita ». Mi ne scias klarigi al mi la uzon de « mi ne estas ankoraŭ resanigita », kiu estas franclingva parolturno. La vorto « ankoraŭ » ne taŭgas ĉi-tie; ĝi estas necesa ekzemple en la sekvanta frazo: « Mi havas ankoraŭ 15 frankojn » kaj la vorto « jam » donus tie-ĉi tute alian signifon. Do du vortoj je malsana signifo ne povas utili por esprimi saman ideon.

KAMELO.

## Priskribo de la urbo GENTO.

Nun ni vizitos, sur la Kajo de la Grenoj, la

### Maristodomon

ravinda juvelo de la jaro 1531, kie estis lokita la Gildo au Korporacio de la Boatistoj.

Flanke de ĝi staras du aliaj laŭ la romanstilo konstruitaj vidindaĵoj, la

### Domo de la Grenmezuristoj kaj la Domo de la Atendo

tiu ĉi lasta, iama provizejo de grenoj. Ĉiu ŝipo transportante grenojn laŭlonge la Leie kaj Schelde devis halti kontraŭ tiu ĉi domo kaj pagi imposton per grenoj.

Trapasinte tiujn juvelojn de la mezepoko ni vizitas la

### Grandan Viandvendejon

konstruaĵo de la 16a centjaro. Ĝi estis aliformigata antaŭ kelke da jaroj en filio de la fervoja administracio.

Malantaŭ la kafejo nomata « la Domo de la Pendigilego » starante apud flanko de la konstruaĵo troviĝis la ekzekutejo por la krimuloj. Kelkajn restaĵojn oni povas ankoraŭ vidi

## La Vendredovendejo

La vendredovendejo estas la iama gentaforumo. Sur tiu ĉi placo estis grupiĝintaj la korporacioj kiam ili bezonis defendi arme la honoron au la interesojn de la urbo. La placo kalkulas 5000 metrojn da supraĵo. Meze de ĝi staras la bronza statuo de Jakobo Van Artevelde, la ĉefo de la gentaj gildoj en la 14a centjaro. Sur la Vendredovendejo okazis en la mezepoko la solena recepcio de la grafoj de Flandrujo. La placo estas cirkaŭata de antikvaj domoj el kiuj unu estas nomata

### La Tureto

konstruaĵo de la 15a centjaro, la antaŭa konvenejo de la korporacio de la tanistoj.

Trapasinte la placon, oni ekvidas, je la fino de la strato Longa Monero,

### Margrite la Frenezulino

granda kanono (au bombardilo) ripozanta sur tri ŝtonaj subteniloj. Oni ignoras ĝian aĝon, tamen la historiskribantoj certigas ke la Gentanoj uzis ĝin dum militado kontraŭ la loĝantaj de Audenaerde. Ĝi estas longa 5 metroj, ĝia konturo estas 3 metroj, kaj ĝia interna diametro 65 centimetroj; ĝi pesas 33.600 funtojn. Ĝi estas alnomata « Dulle Griete » (Margrite la Frenezulino) je la memoro de princino kiu mortis en la jaro 1227.

Irante tra la strato Longa Monero ni atingas la

### Kastelon de la Flandraj Grafoj.

Estas konstruita aŭ plibone rekonstruita dum la 1180a jaro sur la antaŭaj fundamentoj de kastelo de la 9a au 10a centjaro; tiuj restaĵoj estas ankoraŭ bone videblaj.

Ĝi estas feŭdala fortifikaĵo kie loĝis la diversaj grafoj de Flandrujo. Je la vidpunkto de l'historio kaj de arĥeologio, estas la plej perfekta specimeno en Eŭropo; neniam feŭdala fortifikaĵo povas esti kumparata kun ĝi. Ĝi utilis kiel restadejo por la flandraj grafoj ĝis la jaro 1350, poste kiel kunvenejo de la Konsilantaro de Flandrujo; poste estis aliformigita je malliberejo, k.t.p. Starante sur la plataĵo de la kastelo oni ĝuas belegan vidaĵon super la urbo kaj ĉirkauaĵo.

Oni povas viziti la kastelon ĉiutage, de la 1a de Aprilo ĝis la 30a de Septembro, de la 10a matene ĝis la sepa posttagmeze, kaj de la 1a de Oktobro ĝis la 31a de Marto, de la 10a matene ĝis la 4a posttagmeze. La prezo por eniri estas 50 centimoj po persono, kaj 2 frankoj po grupoj de 5 ĝis 10 personoj.

La festajn tagojn ĝi estas malfermita por la publiko, senpage.

Rabotilejo.

Estas konstruaĵo de la jaro 1498, memorajo de la malvenko de la armeo de Frederiko la tria. Ĝi estas malgranda fortifikajo havanta du rondajn turetojn.

La Molnava Beginejo.

Oni certigas ke ĝi estis la plej bela el Eŭropo, malfeliĉe ĝi estis destinsangata en la jaro 1873 kaj anstataŭgata per nova konstruaĵo en unu el la antaŭurboj. La nova Beginejo en Mont-S'-Amand certe meritas viziton.



KOMERCA FAKO.

MALFERMO DE KOMERCEJO.

Gento, la 2an de Augusto 1913.

Trs Estimata Sinjoro,

Per tio mi permesas al mi, sciigi vin, ke mi malfermis hodiaŭ en la Stropstrato forsenddomon (pogrande) de silkkomercaĵoj sub la firmo « Silkdomo Paris ». Samtempe mi transsendas al vi mian katalogon en lingvo Esperanto, kiun mi rekomendas speciale al via afabla atento. Mi petas, subteni mian entreprenon per afablaj komisioj senperaj. Mi promesas al vi ĉiam akuratan kaj precizan plenumon de viaj afable transdonotaj komisioj kaj ĉiam je malaltaj prezoj. Mi petas noti mian subskribon.

Atendante viajn afablajn mendojn mi restas,

Kun alta estimo,  
J. VERSCHUEREN kaj K<sup>o</sup>

Katalogo.

Esperantistoj! Favorizu la magazenojn kaj personojn, kiuj anoncas en nia " Bulteno ", kaj diru al la vendistoj, ke vi estas Esperantistoj!

PLIVASTIGO DE EKSPORTA KOMERCO.

Gento, la 4an de Majo 1913.

Sinjoroj DE PAUW kaj K<sup>o</sup> en

Parizo.

Estimataj Sinjoroj,

Ni havas la honoron informi vin, ke, por la celo plivastigi nian komercadon de eksportado de niaj kvalitoj de viskioj kaj aliaj alilanden, ni elfaris aranĝojn, kiuj ebligas nin proponi la plej superajn kvalitojn por la plej malaltaj eksport-prezoj.

Ni enmetas prezaron, por via afabla konsiderado, kaj, tuj post la ricevo de viaj novaĵoj, ni estos feliĉaj montri al vi niajn plej favorajn kondiĉojn. Ni restas, Sinjoroj,

Viaj sindonemaj servantoj,  
I. DE VliegHER kaj K<sup>o</sup>.

FORMADO DE PRIVATA AKCIA KOMPANIO

Gento, la 2an de Majo 1913.

Estimataj Sinjoroj,

Ni havas la honoron avizi vin, ke, por pli facile aranĝi la aferojn de partoprenado, ni enskribigis nian komercon kiel Privata akcia Kompanio, sub la nomo de

GEORGES DEZUTTER kaj K<sup>o</sup>  
kies akcioj ne estas aĉetablaj de la publiko.

Tiu ŝango neniel rilatos la ĝeneralan direktadon de la komercado, kiu estos daŭrigata kiel antaŭe.

Samtempe kiam ni dankas vin pro viaj estintaj mendoj, ni esperas, ke la kontentigaj interrilatoj kiuj ĉiam ekzistis inter ni daŭros kun la Kompanio. Ni estas, Sinjoroj,

Viaj Sindonemaj,  
GEORGES DEZUTTER kaj K<sup>o</sup>



FORMADO DE ASOCIO.

*Bruselo, la 4an de Majo 1913.*

*Sinjoroj,*

Mi havas plezuron informante vin, ke mia frato, S<sup>o</sup> J. Martin, kiu estadis longajn jaroj ĉe Sinjoroj Colyn, kaj K<sup>o</sup>, el Gento, kaj kiu, post la ŝanĝo de la Fermo en Akcia Kompanio, estis unu el la Direktoroj de ĝi, fariĝos mia Asociinto tie ĉi post la 1-a de Junio venanta, kaj post tiu dato ni daŭrigos la komercadon sub la nomo E. & F. MARTIN, Fratoj.

Ni estas, Sinjoroj

Viaj sindonemaj servantoj,  
E. & F. MARTIN, fratoj.

TRANSDONO DE KOMERCO.

*Gento, la 2an de Junio 1912.*

*Estimataj Sinjoroj,*

Ni havas la honoron sciigi vin, ke, je la supra dato, ni transdonis la komercon ĝis nun faritan de ni ĉe la supra adreso, al S<sup>o</sup> J. B. Lavango kaj K<sup>o</sup>.

La komercado estos daŭrigata sammaniere kiel en la estinteco. Nia S<sup>o</sup> J. Cheret kiu direktadis la komercon dum la dek lastaj jaroj, konservas grandan intereson en la nova Kompanio, kaj estas elektita Agenta Direktoro.

Ni faris uzon el tiu ĉi okazo por danki vin pro via estinta subteno, kaj petas, ke vi volu daŭrigi ĝin al la nova Kompanio.

Ni restas, Sinjoroj,

Viajn servantojn,  
J. LANAZO kaj K<sup>o</sup>

AMALGAMO DE FIRMOJ.

*Gento la 12an de Majo 1913.*

*Estimataj Sinjoroj,*

Per la unua, ni celas informi vin ke ni hodiaŭ amalgamis la du bone konatajn firmojn de Meblo-faristoj, kiuj antaŭe komercadis sub la nomoj, respektive, de Hebbers Bros, el Edward Road, kaj Kali kaj K<sup>o</sup>, el Hammersmith.

Ĝiuj ŝuldoj estos pagataj, kaj ĉiuj havaĵoj estos alprenataj de la nova firmo, kiu de nun komercados sub la nomo Hebbers & Kali kaj K<sup>o</sup>.

Ni esperas, ke la afabla subteno donita, en la estinteco, al la du apartaj firmoj, estos daŭrigata per ili sub la nova aranĝo.

Certigante miajn klientojn pri la rapida kaj zorga plenumado de iliaj ŝatataj mendoj, ni restas, sinjoroj.

Viaj servantoj,  
HEBBERS, KALI kaj K<sup>o</sup>

AKCEPTO DE NOVA ASOCIINTO.

*Antverpeno, la 10an de Majo 1913.*

*Sinjoroj,*

Ni havas plezuron sciigante vin, ke S<sup>o</sup> Ernest Simonis, la plejaĝa filo de nia unua Asociinto, S<sup>o</sup> G. F. Simonis, fariĝis Asociinto en nia firmo, la 1-an de Januro 1912.

Ni restas, Sinjoroj,

Kun alta estimo viaj servantoj!  
F. & E. SIMONIS kaj K<sup>o</sup>

DISIĜO DE ASOCIO.

*Gendbruggo, la 2an de Marto 1913.*

*Sinjoroj,*

Per la nuna, ni deziras sciigi vin, ke la ĝisnuna Asocio inter ni, la subskribintaj Fl. Van Cleemputte kaj G. Vermandere, komercantaj kiel Vin-negocistoj, ĉe 137, Boulevard de la Citadelle, Gand sub la Asocia nomo Van Cleemputte & Vermandere disiĝis je ĝia templimo, la 28-an de Feb. 1913.

Ni restas, sinjoroj,

Kun estimo,  
VAN CLEEMPUTTE & VERMANDERE.

## Kolektado :

S<sup>o</sup> G. Vermandere, rue de la Bienfaisance 85. Gento, kolektas fotografajojn de geesperantistoj; li ankaŭ kolektas ĉiuspecajn reklamilojn, (glumarkoj, k. t. p.) por Esperanto.

S<sup>o</sup> M. Sebruyens, Gentstraat, 34, St-Amandsberg (Gento-Belglando) serĉas en ĉiu lando korespondanton, kiu konsentus sendi al li NE-ilustritajn poŝtkartojn, kartleterojn, banderolojn de ĵurnaloj kun surprisitaj poŝtmarkojn, unuvorte ĉion, kion oni nomas « tutajoj ». Interŝanĝe li sendos ĉion, pri kio la korespondantoj petos. Respondos ĉiam kaj tuj.



## INTERŜANĜADO.

(Sub tiu-ĉi rubriko, ĉiu membro povas fari proponon pri interŝanĝado de Poŝtkartoj ilustritaj, Poŝtmarkoj, Leteroj, Ĵurnaloj, k. t. p.)

Deziras korespondadi kaj interŝanĝi ilustr. p. k. aŭ p. m, nur kun fremduloj :

Fino	<i>Eugénie Colyn</i> , 183, Rempart de Plaisance,	Gand.
»	<i>Adrienne Colyn</i> ,	id id.
»	<i>Irma De Vlieger</i> , 15, Place de l'Ecluse,	id.
»	<i>Fouquet</i> , 28, Rue du Mouton,	id.
»	<i>Schepens</i> , 14, Rue Ch-Louis Dierickx	id.
»	<i>O. Standaert</i> 66, Rue Savaen	id.
»	<i>Suz. Van Hyfte</i> , 228, Rempart de la Biloque,	id.
»	<i>Claire Verschueren</i> 91, Rue Joseph Plateau,	id.
»	<i>Valerie Sallmann</i> Schönbüchlerstrasse, 16	Schonlinde (Austrio)
S <sup>o</sup>	<i>Georges Dezutter</i> , 76, Pêcherie,	Gand.
»	<i>Ernest Simonis</i> , 55, Rue des Entrepreneurs	Mt-St-Amand. (Gand)
»	<i>Flor. Van Cleemput</i> , 137, Bd. de la Citadelle,	Gand.
»	<i>Vermandere</i> , 85, Rue de la Bienfaisance,	id. nur I. P.
»	<i>Jozef Henke</i> , Zittauerstrato (Saksujo)	Neugersdorf P. I. respondas tuj.
»	<i>Otto Geier</i> , E. G. Hoffmannstrato 243,	» » » » »

ĈE LA REDAKTEJO : oni akceptas tre dankeme poŝtmarkojn, ne nur maloftajn por kolektaĵo, sed ankaŭ ĉiuspecajn; ankaŭ ne-ilustritajn poŝtkartojn, banderolojn por Ĵurnaloj kaj kartleterojn. Oni sendos interŝanĝe ĉion pri kio oni petos (ilustritajn poŝtkartojn, ĵurnalojn, librojn, k. t. p.)